FN PER ANC 4+

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

Redaktas Maurice HUET, 63 Boulevard François 1er - 76 LE HAVRE - Majo 1966 = n° 78



## Ĉe l'revekiĝo de l'Espero...

Kiam oni faras al ni la demandon: "Kiom da Esperantistoj en la mondo?", ni respondas: "Milionoj". Sed, verdire, ni ne povas doni ekzaktan ciferon. Kial? Ĉar oni povas nombri nur tiujn, kiuj aliĝis al iu ajn internacia organizo. Tamen, ni ja scias ke multnombraj estas la unuopuloj, de nia movado nekonataj.

Estas la sama afero sur la regiona tereno: ni ne povas kalkuli la nombron de niaj samideanoj. Kial izolulo j ne venas al ni? En Normandio, estas kreita la Unuiĝo, larĝe malfermita al ĉiuj. Ĉiu estas libera (kaj eĉ: devas) aliĝi al tia aŭ tia nacia, internacia aŭ faka asocio, sed, nepre devas esti ano de l'Unuiĝo Normanda de Esperanto. Kia ajn estas la bonvolo de iu, li ne povas sola fari multe. Vera estas la proverbo: "Unuiĝo estas forto."

Imagu kiom pezas la paroloj de iu Esperantisto, kiu reprezentas nur "unu unuon". Ĉar oficiuloj estas ĝenerale ĝentilaj, ili verŝajne aprobos, sed faros ... nenion. Sed la samaj estas multe pli emaj agi se lia interparolanto diras: " Mi estas la reprezentanto de tia asocio, kiu enhavas mil dek mil, cent mil membrojn". La movado Esperantista estas multe pli forta ol ni ofte opinias, sed, ni devas videbligi tiun forton.

Ni ne havos kongreson regionan tiun jaron: ne gravas se en Yvetot, kongresurbo 1967 ni povos kunigi plurajn centojn da normandaj esperantistoj. (Tio ne estas revo: antaŭ kelkaj jaroj, tio efektiviĝis). Kredu min: tiam, la preso larĝe raportos.

Ni fidas la normandan esperantistaron. La loko mem de la proksima kongreso estas pruvo: kie estis plu nenio, grupo renaskiĝis. Kial? Nur tial ke kelkaj agemaj gesamideanoj kuniĝis, tiel elmontrante ke Esperanto estas ja vivanta. Tiu ekzemplo estas imitenda. Gesamideanoj! Varbu, varbu adeptojn!

Maurice HUET, Prez. de U.N.E.

Marie-Gabrielle GRAFFIN

Junulino 17-jara raportas pri ...

## ... sia unua restado en Germanujo

En Hamburg okazis la 9-a Seminario de Germana Esperanto Junularo, de la 27-a de Decembro ĝis la 2-a de Januaro. La temo estis: "Li kaj ŝi, junaj homoj en la moderna mondo". Ni aŭskultis diversajn prelegojn:

"Kio estas amo; ĉu amo estas lernebla?", de Michaël ZEILINGER;

"Ekonomiaj kaj sociaj problemoj de virina laboro", de S-ro BERMANN;

"Juraj aspektoj de internaciaj geedziĝoj", de Profesoro Ivo LAPENNA.

Tiuj prelegoj multe interesis min, ĉar estas la veraj problemoj de la moderna mondo. Post la prelegoj, estis diskutoj.

La 28-an de Decembro, okazis akcepto en la urbdomo. La delegitino de la senatorino pri junularaj aferoj, S-ino Irma KEILHARK, akceptis nin.

Ni ankaŭ vizitis la urbon. Tiu urbo ne estas tre bela, sed tre moderna, kaj la haveno estas grandega. Bedaŭrinde, preskaŭ ĉiutage pluvis, kaj ni ne bone promenis en la urbo.

La 31-an de Decembro okazis la Silvestra balo. Tiu balo estis tre simpatia, kaj ni bone amuziĝis. Je la 12-a horo nokte, ni povis vidi piroteknikaĵon por la nova jaro.

Post la lasta tago, ni havis japanan vesperon.

La 2-an de Januaro, la seminario jam estis finita. Ĉiu devis foriri, sed mi pensas ke ĉiu estas kontenta pri sia restado. Se tiu restado estis tre agrabla por ĉiuj, ni devas danki Eliza'n kaj Peter'n WEIDE, kiuj prizorgis la organizadon de tiu seminario.

Tiun vojaĝon mi povis fari dank'al stipendio donacita de "Zamenhof Kulturcentro" en Les Andelys.

## ... la Paska Kultura Semajno

En Gresillon, la Esperantista Kulturdomo, okazis la 5-a Paska kultura semajno de la 1-a ĝis la 8-a de Aprilo. Tiu semajno estis organizata de la Franca Unuiĝo por Esperanto, sub la aŭspicioj de la Ministerio pri Nacia Edukado.

Tiu semajno estis agrabla, kaj simpatia atmosfero regis en la kastelo. Ni estis proksimume 50 junaj gastoj el ĉiuj regionoj de Francujo, ankaŭ el Danujo, Italujo, Hispanujo, Germanujo kaj Japanujo estis reprezentitaj.

Ni vizitis la ĉirkaŭaĵon de la kastelo: la kastelo de la Reĝo Renato, la Vera Kruco, la preĝejo en Vieil Baugé, la antikva apoteko, ni promenis ĝis la dolmeno. Ni ankaŭ ekskursis. La ĉefaj etapoj de nia ekskurso estis: Saumur, Cunault, Brissac, Angers. La ekskurso estis ege interesa, ĉar la Valo de Loire estas tre bela, kun multaj kasteloj.

Sed, ni ne ĉiam promenis, ni ankaŭ laboris! Ĉiumatene ni studis esperantajn tekstojn sub la gvidado de S-ro Turin. En tiuj kursoj ni lernis gramatikon, ni pligrandigis nian vorttrezoron kaj ni eltrovis belajn tekstojn de Raymond Schwartz, Zamenhof k.T.p. Ni ankaŭ havis prelegojn:

S-ro Duc Goninaz : Ortografio kaj fonetiko en Esperanto.
S-ro Martin : Kial iu dolmeno en Baugé?
S-ro Thierry : Ĉar vorto estas vorto.
S-ro Babin : Edukado kaj toleremo.
S-ro Rousseau: Cu vi konas Islandon, kun prezentado de la lando per lumbildoj, kaj Organizado de U.F.E. rilate al U. E.A.

Ni ankaŭ vidis filmojn :Angoroj, dokumentfilmojn pri la Fiat 850 kaj la Muelejo de la Metilernantoj.

Sed ne kredu, ke ni ĉiam laboris kiel sklavoj! Ni ludis kaj konversaciis kun S-ro Mottillon.

Nun vi havas ideon pri la 5-a Paska Kultura Semajno en Grésillon. Tiu semajno permesas praktiki Esperanton, konatiĝi kun aliaj esperantistoj, promeni kaj ripozi! Cu tio ne estas alloga?

Ni devas danki S-ron Llech-Walter, prezidanto de U.F.E., kiu estis la kultura gvidanto, G-rojn Turin, la pedagogiaj gvidantoj, G-rojn Babin kaj Jellent, administrantoj, Estas ĉefe dank'al ili ke la semajno estis kiel agrabla.

---

# Nia Vivo

SOTTEVILLE LES ROUEN = La kursoj de S-anoj SENE kaj KIJO bone funkcias; malmultaj gelernantoj forlasis ilin. La grupo "Esperanta stelo" renaskiĝis en Sotteville; ĝi nun disponas propran ĉambron, lernejo "Renan", rue Marion . Buso n° 10 (halt.Léon Salva)

VIRE = Funkcias du kursoj: unu, gvidata de S-ro SAPERAS (profesoro ĉe la loka gimnazio, 2 Rue des Capucins) okazas en la licea klasĉambro de S-ro Saperas, ĉiun ĵaŭdon; 32 gelernantoj partoprenas tiun kurson; perfektiga kurso, gvidata de S-ro LEGRET okazas ĉe F-ino TRISTRANT, instruistino, Rue Emile Chénal, ĉiun Merkredon, 18-19-a

- En junio 1965, S-ro SAPERAS akceptis 2 Finlandajn Esperantistojn, Ges-roj PYSTYNEN. S-ro Pystynen, Delegito de U.E.A., projekciis lumbildojn pri sia lando. Granda sukceso de tiu kunveno.
- S-ro HALBENT , deputito-urbestro, kaj pluraj eminentuloj, subskribis la petskribon de U. N. O.

ROUEN = La grupo en Rouen regule kunvenas la 1-an lundon, ĉiumonate. Notu ĉefe ke la grupo interŝanĝis diapozitivojn pri Rouen (faritaj de S-ro Loisel) kun geamikoj en Norwich (Britujo), kun klarigoj per sonbendo. Projekto: same fari kun Krakovo (Polujo).

YVETOT = Renaskiĝis grupo. En la estraro, ni trovas konatajn nomojn: S-ro HIS, Prezidanto, S-ro CHERFILS , kasisto, S-ino POTTIER, arĥivistino. Nia amiko Pierre POTTIER zorgas pri la kursoj.

- En la mondon venis ... tria knabeto, la filo de niaj Geamikoj POTTIER. Niajn plej korajn gratulojn!

LES ANDELYS = Tre bone funkcias la kursoj de S-ino VINCENT, kiu, plue, estras la Zamenhof-Kulturcentron.

- S-ino VINCENT ĵus ricevis la diplomon pri Altaj Studoj. Ni tutkore gratulas ŝin!

LE HAVRE = Dum lasta ĝenerala kunveno, la anaro debatis pri novaj statutoj. Partoprenantoj ne decidis ĉu ŝanĝi aŭ ne la formon de nia rondo, kaj nova debato okazos dum venonta monata kunveno, helpe de libreto "Comment former un groupe culturel". Nova estraro estas elektita: Prezidanto: S-ro SAUTREUIL, Sekretariino: S-ino COLLEU, kasisto: S-ro GIBAUX.

- S-ino LAVALLEE partoprenos la nacian kongreson en Agen, kaj reprezentos la Havran Grupon.
- Okaze de internacia ŝakrenkonto, ni havis okazon revidi la eksprezidanton de la Caen'a grupo, S-ro DUTHILLEUL, kiu partoprenis la ko,kurson en kategorio "open".
- Lastan sabaton de ĉiu monato, la grupo kunvenas en salle "François 1er"; ĉiuj estas bonvenataj!

LISIEUX = Ekzistas en Lisieux du grupoj kiuj studas la Esperantan lingvon. La unua, gvidata de S-ro Camille MARTIN, kuniĝas ĉiusemajne en M. J. C.

La dua grupo, iom pli sperta, kunvenas de tempo al tempo, kaj la anoj elektas temon; ekzemple, S-ino RAULT parolis pri la Universala Kongreso en Tokio, insistante pri Hiroŝima; S-ro BARASSIN montris belegajn diapozitivojn faritajn dum vojaĝo tra la suda parto de Francio.

La 8-an de Marto, S-ro BOSC, la ĉiam sindonema Honor-Prezidanto, vizitis tiun grupon. Tiun vesperon, S-ro Rault resumis la verkon de Roy Mac Gregor Hastie pri "La vivo de Mao Tse Toung".

La 22-an de Marto, S-ro Barassin denove gvidis tre interesan vojaĝon sed, tiufoje, tra la ĉielo. Li klere parolis pri la Luno, la diversaj planedoj, K.t.p. tra maniere la Grupanoj faris-en ĉambro -ne danĝeran ĉirkaŭon.

Rapide pasas la tempo.....Kaj vere la etoso estas tre simpatia.

---

# KONGRESOJ

28-30 Majo = 58-a Nacia Kongreso de U. F. E., en Agen

19-23 Julio = 27-a Hispana Kongreso, en Bilbao - Aliĝilo senpaga al la L.K.K., Barrencalle Barrena 7 - Bilbao (5)

23-30 Julio = 39-a S.A.T. Kongreso, en Swanwick (BRITUJO)

30 Julio/6 Aŭg. = 51-a Universala Kongreso de U.E.A. en Budapesto (HUNGARIO)

---

# Rondo pri lumbildoj kaj sonbendoj

J K P Esperanto grupo en Svitavy ĈSSR (Ĉeĥoslovakio) deziras formi rondon kie kunlaboros 10 Esp-grupoj el diversaj landoj.

Tiu propono estas tre interesa ĉar, po unu jara sonbend-registrado, ĉiu grupo povos disponi 10 bendojn jare. Sin turni al la ĉi-supre adreso.

---

# EKZAMENOJ

Ekzamenoj pri Lernado, Supera lernado kaj Kapableco okazos en HAVRO, la 11-an de Junio 1966. Sin turni al S-ro SAUTREUIL, 2 Rue Henri Belenger, LE HAVRE.

---

# Via kasisto,

E. JOUIS, 621 Rue Georges Mugnier, BOISGUILLAUME (76), memorigas al vi ke la nomo de la kasisto kaj ankaŭ la numero de nia poŝtĉekkonto ne ŝanĝiĝis. Do, se tion vi ne jam faris, vi devas sendi vian kotizon (Min. 2 Frankojn) al UNION ESPERANTISTE DE NORMANDIE - C.C.P. ROUEN 283-40, prefere per ĝiro. Tamen, vi ankaŭ povas pagi per poŝtmarkoj aŭ bankĉeko, rekte al la kasisto.